



Programo de la turismaj ekskursoj 2014

lunde 30an de junio :

libera mateno por piediri en la ĉirkaŭaĵoj,

posttagmeza ekskurso al Cheffes :

- Vizito de la kastelo Plessis-Bourré apud la urbeto Cheffes ; la kastelon dum la 15a jc. konstruigis Jean Bourré, ministro de reĝo Ludoviko la 11a ; la kastelo spegulas la transiron de mezepoko al renesanco
- Reveno al Baugé por malkovri la kastelon de la reĝo René de Anĵuo kaj la historian apotekon de la iama malsanulejo.

marde 1an de julio :

tuttaga ekskurso al Langeais, Azay le Rideau kaj Chinon (tagmanĝo en restoracio)

- En la urbeto **Langeais**, renkontu la reĝon Karlo la 8a kiu edziniĝis kun Ana de Bretonujo en 1491. en la kastelo Langeais
- Apud Langeais, situas la fama kastelo de la urbeto **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj
- Ni vidos de ekstere la reĝan fortikaĵon de Chinon kie Johana de Arko renkontis la reĝon Karlo la 7a en 1429
- Ni vizitos la domon "La devinière" kie naskiĝis la fama verkisto **Rabelais** fine de la 15a jarcento apud Chinon

merkrede 2an de julio :

tuttaga ekskurso al Amboise kaj Chenonceaux (tagmanĝo en restoracio)

- La reĝo Karlo la 8a naskiĝis en la kastelo de la urbo **Amboise**, konstruigis reĝan loĝejon per italaj laboristoj kiam li ekregis en 1491 (komenco de la franca renesanco) kaj mortis tie pro fruntofrapigo kontraŭ la supra sojlo de pordo!

Vi renkontos la lastan reĝon kiu vivis en Luar-kastelo, Francisko la 1a kaj Leonardon de Vinĉi (ni vizitos la domon kie li vivis apud la kastelo de la reĝo)

- Proksime de Amboise, situas la kastelo de la komunumo **Chenonceaux**, nomita la kastelo de la damoj, tie vivis Diana de Poitiers kaj Katarina de Mediĉoj

jaŭde 3an de julio :

posttagmeza ekskurso al Rocheminier kaj boat-promenado

- Troglodita vilaĝo Rochemenier : malkovru vivlokojn kaŝitajn en la kalkaj rokoj, preĝejon, kuirejon, vestejon ktp.

- Boat-promenado « Luaro Sovaĝa » ekde ŝipejo en la urbeto St.-Mathurin-sur-Loire, oni observas i.a. kastorojn kaj ardeojn

vendrede 4an de julio :

tuttaga ekskurso al Blois kaj Chambord (pikniko)

- La reĝo Ludoviko la 12a naskiĝis en la kastelo de la urbo **Blois**, li edziniĝis kun la dukino Ana de Bretonujo kiam Karlo la 8a mortis sen heredanto kaj ili loĝis precipe en tiu kastelo. Francisko la 1a, la postsekva reĝo, konstruigis novan alon en renesanca stilo

- Proksime de Blois, situas la grandioza kastelo **Chambord**, konstruita de reĝo Francisko la 1a, ne por loĝi, sed por ripozi post ĉasado en la granda arbaro. Provu observi aprojn kaj cervojn tie

sabate 5an de julio :

tuttaga ekskurso al Angers kaj Fontevraud, pikniko apud la rivero Luaro ĉe la kastelo Monsoreau

- Mezepoka kastelo de la urbo **Angers** malantaŭ blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj ; intene oni malkovras la tapetaron pri **Apokalipso** mendita de reĝo Ludoviko la 1a de Anĵuo ĉirkaŭ 1370

- Murtapiŝo « Kanto de la mondo » en la muzeo **Jean Lurçat** en Angers, teksita en Aubusson (urbo de centra Francujo) de 1957 ĝis 1966, ĝi spegulas la tapetaron mezepokan por esprimi kosman vizion pri Homo en Paco kaj Gloro

- Promenado tra la urbocentro de Angers al la katedralo Saint-Maurice. La skulptaĵoj de la sanktulo kaj kunuloj en kostumoj de la 16a jc. Krome belega aro de vitraloj de la 12a ĝis 16a jc., kiu ebligas kompreni la evoluadon de la vitralarto

- Abatejo de Fontevraud : 900 jaroj da historio, grandega bieno por monaĥoj kaj monaĥinoj sub la aŭtoritato de virino, « la abatino », ekde la 12a jc. Dum la regno de Ludoviko la 14a (17a jc.), nobelaj junulinoj ricevis tie kristanan edukadon. Napoleono la unua ordonis la fermon de la abatejo por transformi ĝin al malliberejo kie oni nombris ĝis 2000 viroj ; la malliberejon oni fermis nur en 1963.

informoj en gresillon.org/s2